

Enhavo

- **anoncoj**

anoncoj

Forpaso de William C. DICKERMAN; KER-ekzameno okazos ĉe Stanford; Esperanto Day 2013; Article by E. James Lieberman in *Shalom*; Novaj varoj en la libroservo.

- **Nia vojaĝo en Esperantujo**

vojaĝe tra la mondo - Arlyn KERR

Dum la lastaj 11 jaroj mi partoprenis en la interreta listo DENASK, por familioj kiuj uzas Esperanton kun siaj infanoj. Mi ofte legas pri kunvenoj de tiaj familioj, kaj fine mi decidis partopreni en unu.

- **Revene de TKEK**

de la prezidanto - Orlando E. RAOLA

Nia ŝtato Kalifornio estas multflanke unikajo ambaŭ en nia lando kaj eĉ en la historio de la homaro. Neniam kaj nenie antaŭe ariĝis tiom diversa homa amaso kia estas la 38-miliona loĝantaro de la Ora Ŝtato nuntempe. Kaj certe tiu diverseco respeguliĝas en la konsisto de la esperantistaro kaj eĉ de la partoprenantoj de TKEK.

- **Mia malkovro de Japanujo (kvara parto)**

vojaĝe tra la mondo - Ĵenja AMIS

Ĵenja daŭrigas la rakonton de siaj aventuroj en Japanujo, ĉi-foje en Kobeo.

- **Recenzo: *The Universal Language***

kino - Jim RYAN

Kiam mi eksciis pri la filmo mi tre ekscitiĝis, kaj eĉ komencis pensi pri uzo de la filmo por kapti intereson pri nia lingvo... ĝis kiam mi spektis ĝin. Bedaŭrinde, ĝi estas nur la plej lasta el longa serio de falsaj bildoj pri Esperantujo faritaj de usonanoj kiuj preferas ludi kun si mem.

- **Frazludo**

ludoj - Daĉjo RUTAN

Frazludo estas tabuloludo por lernantoj kaj instruistoj de Esperanto.

- **Trinkaĵo-truko**

enigmoj - Hoss FIROOZNIA

Kompatinda Ludoviko! Difektiĝis unu el la dek du specoj de trinkaĵoj produktitaj en lia trinkaĵofabrika. Helpu lin plej rapide trovi la difektitan specon!

- **“Svelto”**

senintenca esperantaĵo?

Jen superbazaro por maldikiĝemaj esperantistoj. (Dankon al Jessica GRASSO.)

ISSN: 1056-0297

Usona

Esperantisto

Dum onata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2013:2 (mar-apr)

Esperantist

Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2013:2 (mar-apr)

American



Les KERR

Ĉi-numere:

- Film review: *The Universal Language*
- Vojaĝo en Japanujo (parto 3)
- Ludoj: *Frazludo*
- ...kaj multe pliz

Atente partoprenante la Novjaran Renkontiĝon (NR) en Germanujo

Forpasoj

Forpasis **William C. DICKERMAN** de Houston, Teksaso, la 13-an de Februaro, 2013. Li estis membro de Esperanto-USA ekde 1997.

Ne maltrafu vian ŝancon trapasi la KER-ekzamenon

Nur la duan fojon, la skribitaj ekzamenoj de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) okazos en Usono. La ekzamenoj oficiale akreditiĝas kaj estas nepraj por homoj kiuj volas uzi Esperanton en sia laboro. La sesio okazos la 8-an de Junio ĉe la universitato Stanford en norda Kalifornio.

Por pli da informoj pri la sesio ĉe Stanford, vizitu la retpaĝon de KER [<http://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj>] aŭ sendu retpoŝton al Amanda SCHMIDT, <amanda_higley@yahoo.com>.

Por pli ĝenerala informo pri KER, vidu intervjuon kun gvidanto Katalin KOVATS pri la KER-ekzamenoj [<http://www.ipernity.com/doc/67438/9867410>]. Instruisto Birke DOCKHORN prelegis pri KER ĉe la Landa Kongreso en Dalaso [http://youtu.be/93C3z_VTbRA].

Esperanto Day 2013

The theme for Esperanto Day and for the World Esperanto Conference in Reykjavik, Iceland this year is *Justa Komunikado* ("fair communication"). Esperanto Day is held on the 26th of July each year and coincides with the date of the publication of the first text book in Esperanto in 1887 called the *Unua Libro*.



A PDF poster for use on Esperanto Day 2013 [<http://goo.gl/dFk7V>] is available for placement wherever you are able. (Public libraries etc.) And when you're contacting local media and organizations about Esperanto Day 2013, why not send them some Useful Phrases in Esperanto [<http://goo.gl/0U5Ev>]? Don't forget a clear cover letter along with the phrases!

—Brian Barker, *Esperanto Lobby UK*

A Language of Hope

The April issue of the journal *Shalom* [<http://jewishpeacefellowship.org/documents/ShalomApril2013.pdf>] features an article by E-USA member E. James Lieberman titled "A Language of Hope", an English-language introduction to the early history of the Esperanto movement. The issue is free to download in PDF format.

Novaj varoj en la libroservo

KIU LINGVO?

Konga Espero kaj JoMo

A new album in the *Afrika Kompilo* project. The music of Konga Espero spans genres from reggae and zouk through latino and funk rock, with themes of political engagement, world peace, and romance. Recorded in Kinshasa in 2009, tracks include *Karulino*, *Malpaco en Afriko*, *Nur landlimoj nin disigas*, and the title track, *Kiu lingvo?* CD. 77 mins. France. \$31.10. (link) [<http://goo.gl/t9QQG>]



Used books

- **CIVILISATION E LINGUA UNIVERSAL**

By Stefano Bakonyi. Good condition. Paperback. 320 pages. 1978. Essays about

history, culture and language. All text in Interlingua. \$25.00

- **ĈINIO 2004**
Bona stato. Mola bindaĵo. 120 paĝoj. 2004. Eldonita por la UK. Diversaj faktoj pri historio, teritorioj, loĝantaro, ktp. \$20.00
- **ĈINIO – FAKTOJ KAJ CIFEROJ DE 2004**
Bona stato. Mola bindaĵo. 90 paĝoj. 2004. Kun multaj bildoj. Eldonita de Nova Stelo. \$8.00
- **DANA ANTOLOGIO**
Bona stato. Malmola bindaĵo. 259 paĝoj. 1961. Inkluzivas mallongajn verkojn de Hostrup, Kierkegaard, Hans Christian ANDERSEN. \$20.00
- **DECE CONTOS**
By Alexander Gode. Good condition. Paperback. 27 pages. 1958. Ten short stories in Interlingua by the motor of the Interlingua movement. \$20.00
- **DEKKINGA FUĜAS**
De Tjeerd ADEMA. Ne tre bona stato. 220 paĝoj. 1957. Rakonto pri apoteko en Danlando kiu fuĝas de la polico. \$8.00
- **DISCUSSIONES DE INTERLINGUA**
By Alexander Gode. Good condition. 73 pages. 1983. Short essays about Interlingua, IALA, etc. The entire text is in Interlingua. \$20.00
- **EDINBERG POCKET DICTIONARY**
Fair condition. Hardcover. 204 pages. 1927. Pages beginning to separate from the binding. Two-way dictionary. \$10.00
- **EL LA BIBLIO**
Trad. L. L. Zamenhof. Bona stato. Mola bindaĵo. 48 paĝoj. 1924. Ĉapitroj el

Psalmaro, Sentencoj, Predikanto. \$0.70

- **EN LA NUBON ŜI SORBIĜIS FOR!**
Bona stato. Mola bindaĵo. 62 paĝoj. 1973. Pri la faligo de atombombo sur Nagasaki en 1945. Poemoj kaj rakontoj. \$10.00
- **ESPERANTO MOVEMENT, THE**
By Peter G. Forster. Good condition. Paperback. 413 pages. 1982. Part I deals with the dynamics of the movement in context of European international relations. Part II deals with Esperanto in the context of British society. Text is in English. \$15.00
- **ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY**
By Edward A Milledge. Good condition. Hardcover. 485 pages. 1956. Predecessor to the Esperanto-English dictionary by Butler. \$25.00
- **ESPRIMO DE SENTOJ EN ESPERANTO**
De Edmond PRIVAT. Bona stato. Mola bindaĵo. 61 paĝoj. 1957. \$7.00.
- **INTERLINGUA-ENGLISH DICTIONARY**
By IALA. Good condition. Hardcover. 415 pages. 1951. Some underlining in the introduction. \$30.00
- **INTERLINGUA GRAMMAR**
By Gode and Blair. Good condition. Hardcover. 118 pages. 1971. All explanations are in English, with many Interlingua examples. \$30.00

Order from **Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530**, or online [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>]. If a title is out of stock, the online bookstore can notify you by email when it becomes available again. Due to fluctuations in the value of the dollar, all prices are subject to change without notice.

Nia vojaĝo en Esperantujo

Arlyn KERR

Dum la lastaj 11 jaroj mi partoprenis en la interreta listo DENASK [<http://groups.google.com/group/denask>], por familioj kiuj uzas Esperanton kun siaj infanoj. Mi ofte legas pri kunvenoj de tiaj familioj, kaj fine mi decidis partopreni en unu. Do, mi kaj mia edzo Les aliĝis al la 11-a Novjara Renkontiĝo (NR). Tiu semajnlonga kunveno okazas en diversaj urboj en Germanujo, kaj ĉi-jare la loko estis Xanten.

Ni unue supozis ke ni estos la solaj maljunuloj, sed fakte, kvankam la plejmulto estis infanoj kun siaj gepatroj, aŭ solaj junuloj, ankaŭ ĉeestis multaj grizharuloj kiel ni. Inter la proksimume 150 partoprenantoj el eble dek landoj, mi kaj Les estis la solaj usonanoj. La malofta krokodilaĵo estis en la germana lingvo. La aranĝo okazis en moderna, komforta junulargastejo; ŝajnis ke nur nia grupo estis tie. Les kaj mi havis nian propran ĉambron kun duŝejo. La manĝoj estis bongustaj, kaj – grave por ni – ĉiam estis vegetaraj elektoj.

La programo estas plenplena; ĉiam estis ĝis ses elektoj. Por la plenkreskuloj estis lecionoj por komencantoj kaj progresantoj kaj konversacia kurso; por infanoj estis klaso uzante la vidbendon *Mazi en Gondolando*, legado de rakontoj, kaj kantado. Ĉiutage estis kantado, manlaboroj (mi kreis “songokaptilon”), lecionoj pri ĵonglado, kaj aliaj agadoj. Mi ĉeestis paroladojn pri fotado, grafiteorio (matematiko), edukado de alte dotitaj infanoj en la lerneja sistemo, kaj la scienco de dormado, inter aliaj. Preskaŭ ĉiutage mi ĉeestis kurson pri budhismaj meditado kaj filozofio. Mi provis svingodancadon kaj eĉ lernis danci la polonezon! Ĉar estis tiom da elektoj, ĉiu parolado kaj diskuto havis ne tro multajn homojn – kutime inter dek kaj dudek – kio kreis intiman etoson.



Junuloj senpacience atendas koncerton de JoMo.

Ni partoprenis en ekskurso al arkeologia parko (Xanten estis romia urbo antaŭ 2000 jaroj). Ĉiutage ekzercigis la kvarvoĉa ĥoro, sed mi preferis la grupon por kanonaj kantoj. Dum la vesperoj okazis koncertoj (mi ĉiam ĝuas la energion de JoMo, sed Tone kaj Vjera estis novaj por mi), pupteatraĵo, kaj dum la lasta vespero kelkaj talentaj infanoj kaj plenkreskuloj amuzis nin per kantoj, instrumentoj, dancado, ĵonglado, kaj dramo. Post la silvestra balo kaj bufedo, ni spektis apudan piroteknikaĵon; malsimile ol en Usono, en Germanujo ĉiu rajtas aĉeti piroteknikajn raketojn.

Antaŭ la renkontiĝo ni vizitis niajn korajn amikojn en Lepsiko (Leipzig). La patrino estis la unua korespond-amiko de Les kiam li eklernis Esperanton antaŭ 26 jaroj. Intertempe li vizitis la familion trifoje, nia filino vizitis dufoje, kaj kelkaj el la familio vizitis nin en Seatlo dum la jaroj. Do estis granda plezuro por mi viziti la familiajn domojn kaj renkonti kelkajn familianojn je la unua fojo. Pasigi Kristnaskon kun ili feliĉigis min. Niaj konversacioj ĉirkaŭ la manĝotablo estis interesaj, ĉar kelkaj en la familio parolis nur la germanan, kelkaj la germanan kaj la anglan,

kelkaj la germanan kaj Esperanton, mi kaj Les la anglan kaj Esperanton... kiel oni povas imagi, multe da tradukado necesis! La ĝojo daŭris kiam tri familianoj akompanis nin per trajno al NR, kaj restis tie por la unuaj kvin tagoj.



La infanoj kreas "sonĝokaptilojn".

Estis aparta plezuro aŭdi la babiladon de etaj infanoj en Esperanto. Ekzemple, kiam mia jogo-instruistino diris al la klaso, "Tio estas la fino. Nun vi povas aŭ ripozi ĉi tie dum kelkaj minutoj aŭ manĝi", eta voĉo de tri-jarulo aŭdiĝis: "Mi volas manĝi!"

En la mezo de la semajno televid-stacio sendis raportiston por intervui kelkajn partoprenantojn por la vespera novaĵelsendo. Nia amikino estis unu el la elektitaj, kaj tiuvespere ni ĝuis rigardi ŝin je la televidilo.

Mi surpriziĝis renkonti germanan viron kiu estis nia gasto per Pasporta Servo antaŭ dudek jaroj. Nun li estis kun sia nederlanda edzino, kiun li unue renkontis en Esperanta kunveno, kaj iliaj tri infanoj. Niaj amikoj el Lepsiko devis foriri post kvin tagoj. Ili mankis al ni, sed je tiu tempo ni jam havis plurajn novajn amikojn.

Mi renkontis multajn personojn kies nomojn mi rekonis de la listo DENASK. Nun kiam mi legas iliajn mesaĝojn en la listo, mi povas bildigi ilin

kaj iliajn infanojn.

Danke al la bonega organizo de Lu WUNSCH-ROLSHOVEN kaj liaj helpantoj, ĉio glate iris. Ni vere sentis nin en Esperantujo; ŝajnis kiel alia mondo.

Post la kunsido ni profitis la proksimecon de Roterdamo por viziti la centran oficejon de UEA. Ionel ONET bonkore gvidis nin tra la granda konstruaĵo farita en 1887, la sama jaro en kiu naskiĝis nia lingvo. Post tio ni pasigis kelkajn tagojn en Amsterdamo, kie ni vespermanĝis kun unu el la partoprenantoj de NR kiu loĝas tie. Tiel finiĝis nia neforgesebla sperto en Esperantujo.



Ionel montras al Arlyn la libroservon en la Centra Oficejo de UEA.



Arlyn KERR

Arlyn, kun sia edzo Les kaj filino Julie, esperantistiĝis en 1985. Konsiderante ke ŝi ne ŝatas vojaĝi, estas mirinde ke ĉi-jare ŝi partoprenos en kvar Esperantaj kunsidoj: Novjara Renkontiĝo en Germanujo, Mez-Kanada

Renkontiĝo en Otavo, UK en Islando, kaj NOREK en Brita Kolombio.

<arlyn@morsekob.org>

Revene de TKEK

Orlando E. RAOLA

Mi ĵus revenis hejmen el la kalifornia ĉefurbo Sakramento, kie dum la semajnofino, de vendredo ĝis dimanĉo kunvenis denove la Tutkalifornia Esperanto-Konferenco (TKEK). La konferenco okazis en la Internacia Junulara Gastejo de Sakramento, belega kaj luksa 19-jarcenta konstruaĵo en la urbocentro. Mi ĝoje raportas, ke la stato de Esperanto en ĉi tiu angulo de la universo estas tute bona, ke la nova generacio de esperantistoj, kiuj transprenas la torĉon de la tria-aĝuloj estas tute preta kaj la sperto partopreni aranĝojn kiel TKEK estas ĉiam inspira kaj anim-fortiga.



Partoprenantoj en TKEK 2013 ariĝas ĉe la enirejo de la Internacia Junulargastejo de Sakramento, Kalifornio 2013-04-19/21.

Nia ŝtato Kalifornio estas multflanke unikaĵo ambaŭ en nia lando kaj eĉ en la historio de la homaro. Neniam kaj nenie antaŭe ariĝis tiom diversa homa amaso kia estas la 38-miliona loĝantaro de la Ora Ŝtato nuntempe. Kaj certe tiu diverseco respeguliĝas en la konsisto de la esperantistaro kaj eĉ de la partoprenantoj de TKEK. Interese, ke venis al nia renkontiĝo ankaŭ esperantistoj de najbaraj ŝtatoj Nevado kaj

Vajomingo. Kion pri la aĝa diverseco? Tute bone reprezentita, ĉar la plej junaj partoprenantoj estis la ĉarmulinoj Aŭtuno kaj Daniela, filinoj de la ĉefa organizanto de la renkontiĝo, Amanda HIGLEY. Ili babilis kaj ludis kun ni ĉiuj, montrante la kutiman naturecon kaj esprimante fidon karakterizan de la denaskuloj, dum la plej aĝaj... bone, ni havas sufiĉe da veteranoj en niaj vicoj, dankon. Kion diri pri la ĉeesto de nia kara Steĉjo BELANT, kiu kuraĝe batalas por resaniĝo, sed kiu dume verkis buntan kaj informriĉan nacilingvan varbilon? Miriga kaj feliĉiga renkontiĝo!

Intence la organizantoj ne starigis detalan programon longe antaŭ la konferenco. La programo estis finpretigita kune de la partoprenantoj dum la unua renkontiĝo. Ĝi inkluzivis prezentadon fare de Wally DU TEMPLE (el najbara Brita Kolombio, Kanado) pri la nuno kaj estonteco de ESF (*Esperantic Studies Foundation*); de Ed WILLIGER pri funkciigado kaj organizado de Esperanta Klubo kaj Amanda HIGLEY informis pri la KER-ekzamenoj.

Mi mem parolis pri la estonteco de Esperanto en Kalifornio kaj la urĝa bezono krei regionan organizon por pluvivigi TKEK-on en la venontaj jaroj. Ĝis nun nia konferenco okazadas sporade kaj meminitate de la diversaj kluboj kaj aktivuloj dise tra la ŝtato, sed laŭ la plano kunmetita pasintan semajnofinon en Sakramento, de nun ekestos kunordiga organizo, unu el kies ĉefaj celoj estos la certigon de TKEK en regula maniero. Ne mankis tujaj volontuloj por entrepreni la taskojn. Ni ankaŭ konsideris ne limigi la laboron al Kalifornio, sed etendi ĝin al la tuta sudokcidenta regiono de Usono. La grupo ankoraŭ ne havas nomon, sed ja havas homojn kiuj laboras cele al la venonta TKEK en 2015. Ĝi okazos en Las Vegas, Nevado, kaj la provizora

respondeculo estas Aziz DIALLO. Pri la junularaj aferoj de la regiono prizorgos Nikvo WOODS, el Riverside, kaj la starigon de taŭga retpaĝaro kunorgidos Ed WILLIGER. Espereble post la venonta TKEK ni havos similan kunordigan strukturon kiel tiujn jam delonge funkciantajn en la nordoriento kaj nordokcidento de nia landego.

Alia interesa trajto de nia TKEK estis apartaj programoj por komencantoj, ambaŭ veraj komencantoj same kiel “eternaj” komencantoj, kie ili havis paroligajn kaj perfektigajn ekzercojn sub la gvido de Ĉarlie GALVIN kaj Steĉjo SCHWICHOW. Inter la komencantoj troviĝis studento el Peruo nuntempe loĝanta en Santa Barbara, kies vojaĝon diligente aranĝis Lusi HARMON. La defio nun estas, ke post du jaroj, en nia venonta TKEK ili ĉiuj povu partopreni la “spertulan” aranĝon.


Abundis ĉi-semajne ludoj kaj amuziĝo en nia renkontiĝo. Ekzemple, kelkaj ĝuis ludadon de Skrablo en Esperanto, kiun produktis Sandy THACKER. En alia salono, du teamoj frate interbatalis (kaj estis nek venkinto nek venkito) en la PIV-ludo kiun entuziasme gvidis Niko KALIVODA, kie unu grupo verkas du falsajn difinojn por vorto trovita en la vortaro kaj prezentas ilin miksite kun la vera vortara difino. La alia grupo devas diveni, kiu estas la prava vortara difino, kaj se ili sukcesas ili gajnas unu poenton, kaj se ili malsukcesas, la alia teamo gajnas la poenton. Ege amuze, kaj ankaŭ lernige, ĉar de nun ni ĉiuj scios kaj senĝene uzos vortojn kiel *tebaismo*, *satiruso*, *nevajo* kaj *baskulo*.

Kronis la aranĝon la sabata bankedo, kiun ni havis en la gastejo mem. Ĉi-foje, anstataŭ mendi la manĝaĵojn el iu manĝolivera servo, aro de partoprenantoj sub la gvidado de ĉefkuiristo Orlando RAOLA kaj lia edzino Elsa TORRES sukcesis kunmeti sep diversajn pladojn (karotan kreman supon, spinacan salaton kun konfititaj oksikokoj kaj rostitaj juglandonuksoj, fiŝan fileon

en biera saŭco aŭ spinacajn nudelojn en tomata kaj diverslegoma saŭco, blufromaĝajn panbuletojn herbspicitajn, rostitajn herbspicitajn terpomojn kaj fine... fragan torton kun vanila glaciaĵo) en variantoj por ĉio-manĝantoj, vegetaranoj kaj veganoj. Estis vere laboriga entrepreno, mi eniris la kuirejon je la tria kaj restis tie pli malpli ĝis la deka, sed mi aŭdis, ke ĉiuj estis kontentaj pri la manĝaĵoj kaj pri la kvalito de la servado. Estis kortuŝe vidi kiom entuziasme Ĵenja BONDELID sin ĵetis al la laboro, esprimante la ĝojon unuafoje “kuiiri en Esperanto” aŭ kiom rapide kaj diligente Julie SPICKLER certigis, ke la kuirejo revenas al sia originala stato post nia impona festeno.

Dimanĉe ni kunvenis por la foto, disdonis libropremiojn al kelkaj el la ludantoj kaj ankaŭ disponigis al la partoprenantoj librojn donacitajn de la forpasinta loka esperantisto Henry STUDER. Dum la aranĝo ankaŭ funkciis la libroservo de Esperanto-USA.

Revene al mia hejmo, mi trovis la vokon de miaj novaj multaj geamikoj en *Fejsbuko*, kiujn mi jese respondis, certe mi intencas daŭre kunparoli kun ili. Estis ĝojige havi tiel sukcesan aranĝon ĉar ekzemple, la juna Marĉjo GIVENS diris, ke li la unuan fojon partoprenas renkontiĝon de esperantistoj. Ĝis nun tute izolite kaj nur pere de la reto, li akiris mirindan fluecon en Esperanto. Espereble li estis inspirita partopreni multajn tiajn kunvenojn en la estonteco, plej proksime la landan kongreson de Esperanto-USA en Raleigh, Norda Karolino. Ĝis revido, tiam!



Orlando E. RAOLA

Orlando estas prezidanto de Esperanto-USA. Li loĝas en Greenbrae, Kalifornio.

<oraola@gmail.com>

Mia malkovro de Japanujo (kvara parto)

Ĵenja AMIS

Jen la kvara parto de la aventuroj de Ĵenja en Japanujo. La unua parto aperis en numero 2012:5, la dua parto en numero 2012:6. kaj la tria parto en numero 2013:1.

Kiel ni maltrafis alian karieron

Kobeo estas ankaŭ internacie konata pro siaj perloj, kaj ni iras viziti etan perlan muzeon. Jam preskaŭ elirantaj, nin salutas muzea laboranto. Li tre pardonpetas, ke la muzeo ne estas klimatizita kaj ke ni devas suferi en tia varmego. Li invitas nin al sia oficejo, kiu estas klimatizita, kaj regalias nin per malvarma teo. UTSUMI Yoshihiro tre bone parolas la anglan... sed ŝajne (mi vere ne povas kredi tion!) kun sveda akĉento! “Mi loĝis en Svedio”, li respondas mian silentan demandon.

Yoshihiro havas grandegan perlon alpinglitan al lia kolumo. Kaptinte nian rigardon, li donas la perlon al mi kaj demandas tre strangan aferon: “Kiu estas ĝia koloro?”

Ni atente rigardas – ĝi fakte ne estas unukolora, sed ŝanĝiĝas laŭ la lumo: jen ĝi estas verda, jen ruĝa. Sed kaj mi kaj Joel konsentas, ke ĝi tamen estas verda.

“Ĉu vi frenezas?” li diras. “Ĝi estas ruĝa! Se ĝi estus verda, ĝi kostus \$700, sed ĝi kostas nur \$300! Se vi estus profesiaj pritaksistoj de perloj, vi malgajnus \$400 en unu momento!”

Jes, estas tia profesio – pritaksistoj de perloj, rakontas Yoshihiro. Ene de duonsekundo (vi bone legis: duonsekundo!) ili devas pritaksi la valoron de perlo. Kaj tiel dum pluraj horoj! Nu, ŝajne la laboro de perlopritisistoj ne estas por ni – en tia ritmo ni povus perdi kelkajn

milionojn da dolaroj en kelkaj horoj! Fakte, Yoshihiro mem diras, ke li ne povus fari tiun laboron, eĉ malgraŭ tio, ke li laboras jam kvar jarojn kiel ĝenerala direktoro de la japana perl-eksporta asocio – oni devas trejniĝi kiel perlopritisisto dum dek jaroj antaŭ ol praktiki tiun metion!

Li ankaŭ turnas nian atenton al la fenestroj de la konstruaĵo – ili ja aspektas iom malsame ol kutimaj fenestroj, kaj ŝajne eĉ la lumo en la oficejo estas iom alia ol kutime: tio estas, ĉar la fenestroj estas faritaj el la plej multekosta vitro – la sama, el kiu oni faras bonkvalitajn okulvitrojn. Kial? Ĉar en tiu konstruaĵo laboras perlopritisistoj, kaj, kiel vi jam scias, la vitro devas neniel tordi la lumon, por ne ŝanĝi la koloron de la perloj. Sed, eĉ kun tiaj fenestroj, la pritaksistoj povas labori nur kelkajn horojn de la tago: inter 7:30 kaj 12:30 – kiam la sunlumo estas plej neŭtrala.

Perloj... kaj pano !



Perloj de Kobeo.

Malgraŭ tio, ke la perlokultivado ne originas en

Kobeo, la urbo estas tamen nomata *La Perla Urbo*. Kial? Jen klarigo. Pioniro en perloprilaborado – TODO Yasuie, kiu translokiĝis al Kobeo perdinte ĉiujn siajn terojn pro inundego – malkovris en 1921, ke makuletoj sur perloj malaperas, se ili estas prilaboritaj per certa kemiaĵo. Li aplikis tiun malkovron, kaj danke al tio, la kosto de perloj draste malaltiĝis, kaj Yasuie mem fariĝis riĉulo. Tamen, li decidis ne patentigi sian malkovron, dirante: “Ĝi devas prosperigi ĉiujn, ne nur min.” Ĝuste pro tiu strebo disvastigi la teknologion tra la mondo, Kobeo fariĝis konata kiel la Perla Urbo. Alia interesaĵo: Kobeo estas fama pro sia pano (malgraŭ tio, ke pano ne estas tradicia por Japanujo), ĉar ĝi estis unu el la unuaj urboj, kiuj malfermiĝis al eksterlandanoj kaj kie ili povis loĝi en kiu ajn urboparto (en ĉiuj aliaj urboj estis limigoj al tio).

Trinkante la teon, ni ankaŭ lernas diversajn aliajn aferojn pri perloj. Ekzemple, ke japanaj perloj estas inter la plej altkvalitaj en la tuta mondo: la diversaj sezonoj de Japanujo kaj ŝanĝiĝoj de temperaturo aldonas multajn kolorojn kaj apartan brilecon al japanaj perloj. Nun ili feroce konkurencas kun ĉinaj perloj, multe malpli kostaj kaj ĉefe kultivitaj en sensala akvo. “Se en Japanujo en unu konko oni kultivas 1–2 perlojn, en Ĉinujo oni foje sukcesas kreskigi ĝis 50(!) perlojn en unu konko, kompreneble, je la kosto de kvalito”, diras Yoshihiro. En la vendejeto ni vidas kaj tre grandajn perlojn, kaj la plej etajn perlojn, apenaŭ du milimetrojn larĝajn: ni ne povas eĉ imagi, kiel oni povas truigi ilin por fari kolĉenon el pluraj centoj da ili!

La dekstruloj ŝanĝas niajn planojn

Niaj gvidantoj planis viziton al la urbodomo, sed, bedaŭrinde, ĝi estas fermita pro la bruemaj dekstruloj, kiuj okupis la lokon apud ĝi. Bonŝance, neniuj preterpasantoj haltas por aŭskulti la dekstrulojn sur la kamioneto kun laŭtparolilo.

“Kion ili volas?” mi demandas.

“Nenion apartan – simple okazas kunveno de la maldekstrema instruista sindikato, kaj tio estas bona preteksto por brui.”

Do, ŝanĝiĝo de la planoj! Anstataŭ iri al la urbodomo, ni iras butikumi laŭ longa butikaro sub tegmento (estas tre agrable en la ombro dum tia varmega tago!) kaj vizitas cent-enan vendejon – similan al unudolara vendejo en Nord-Ameriko, sed kun pli granda elekto da varoj. Kuriozaĵo: oni vendas personan stampilon por ĉiuj kutimaj familinomoj – ĉar ĉiuj skribas la ideogramojn same, oni bezonas personan stampilon anstataŭ la subskribo. Kompreneble, tiuj stampiloj el cent-ena vendejo estas amas-produktitaj kaj servas nur por tre leĝera uzo. Se oni volas, ekzemple, malfermi konton en banko, oni bezonas speciale faritan personan stampilon, kiun oni devas gardi en sekura loko.

Ni aĉetas niajn revenbiletojn de vendejo, kie oni vendas rabatitajn biletojn por la trajno. “Kiel eblas?” ni demandas, ĉar ĝi aspektas iom suspektinda. Oni klarigas, ke tio estas tute laŭleĝa: multaj japanaj fervojaj kompanioj estas privataj, kaj la akcipoŝedantoj (kiuj ricevas biletojn) ofte vendas ilin malmultekoste al tiaj vendejoj. Foje oni eĉ vendas rabatitajn biletojn en la stacidomo mem!

La cervoj kaj la temploj

El Kobeo ni revenas al Kioto – nia kansaja “bazo”. De tie ni povas viziti plurajn aliajn urbojn en la belega kaj histori plena kansaja regiono. Unu el tiaj tagaj promenoj estas vizito al Nara, nemaltrafinda malnova ĉefurbo de Japanujo dum la prospera oka jarcento. Same kiel ĉie, ni promenas en Nara en akompano (kaj kun bonega ĉiĉeronado) de esperantisto, s-ro KIMOTO Yasuhiro, kiu (bonŝance!) translokiĝis al Nara de Kobeo en 1994, do, unu jaron antaŭ la tertremo. Sur la stacidomo de Nara troviĝas afiŝoj de eta ĉarma bonzo kun cervaj kornoj – jen sintezo de la du plej gravaj allogaĵoj de Nara: temploj kaj cervoj, ambaŭ abundaj. Fakte, en Nara troviĝas pluraj el la plej famaj japanaj vidindaĵoj – sur la

mapo, kiun ni ricevas en la turisma centro, estas indikitaj ĉirkaŭ deko da Mondaj Heredaĵoj de UNESCO.

Alia vidindaĵo de Nara (eĉ se ne deklarita Monda Heredaĵo) estas la ĉarmaj japanaj cervoj — *ŝika*. Laŭ legendo, kiam oni fondis familian sanktejon de la nobela familio Fuĵiŭara (la plej influa klano en la oka jarcento), oni invitis potencon dion por protekti la lokon. La dio venis sur blanka cervo. Ekde tiam la cervoj estas rigardataj kiel diaj mesaĝistoj kaj profunde respektataj. Onidire, antaŭ longa tempo unu knabo estis eĉ ekzekutita, ĉar li mortigis per ŝtono cervon, kiu manĝis la paperon kun lia hejmtasko... Malsame ol sur la insulo Mijaĵima, kie oni ne permesas manĝigi cervojn kaj kie la cervoj estas iom miskondutaj, en Nara neniuj malpermesas tion fari – fakte, oni eĉ vendas *ŝika senbei* – kuketojn por la cervoj. Eble pro tio la cervoj en Nara estas bonkondutaj: ili trankvile atendas siajn kuketojn kaj tute ne provas ŝteli vian (ege bongustan!) mapon.



Cervoj de Nara.

La Kofuku-ĵi-templo kaj bela kvin-etaĝa pagodo estas nia unua halto. Antaŭ du jaroj, tiu templo festis sian 1300-jariĝon, kaj la pagodo estis konstruita en 1426, post kiam ĝi brulis jam kvin(!) fojojn. Nia gvidanto rimarkas, ke en Japanujo oni havas nur tri- aŭ kvin-etaĝajn pagodojn – neniam kvar, ĉar la japana vorto por la cifero kvar sonas kiel la vorto por “morto”.

Ĝuste pro tio en hospitaloj ne troviĝas ĉambroj aŭ etaĝoj markitaj per cifero kvar (nek per la cifero naŭ, kies nomo sonas kiel “sufero”). Por ke la pagodoj eltenu la tertremojn, oni pendigas supre arbotrunkon, kiu stabiligas la konstruaĵon dum la tertremoj. Todai-ĵi-templo – pli bone konata sub la nomo *Daibutsu-den* (“Grand-Budha Halo”) – estas nia sekva halto. Fondita en la oka jarcento, Daibutsu-den (la halo, kie troviĝas la Granda Budho) brulis du fojojn pro diversaj militoj. La nuna konstruaĵo, kiu estas nur du trionoj de la originala, staras ekde 1709, sed eĉ malgraŭ tiu malgrandiĝo, ĝi estas la plej granda ligna konstruaĵo en la mondo!

“Industrio por profiti de malfeliĉuloj”

Ni trapasas la praarbaron, apud kiu troviĝas kelkaj ŝinto-sanktejoj kun miloj da lanternoj, sur kiuj ofte estas skribitaj nomoj de donacantoj al la sanktejo. La etoso en kaj apud la ŝinto-sanktejoj estas tute malsama ol tiu de budhistaj temploj: ĉiuj ŝinto-sanktejoj troviĝas en la arbaro, dum budhistaj temploj pli ofte troviĝas en malfermaj spacoj. Tamen, kaj en ŝinto-sanktejoj, kaj en budhistaj temploj (kiuj ofte troviĝas tuj apude), oni abunde vendas amuletojn por ĉiu okazo de la vivo. Apud Daibutsu ni vidis eĉ “budhomaton”: aŭtomaton, kiu vendas budhojn en plastaj ovoĵoj! Ni vidis en Japanujo vendaŭtomatojn por ĉio, eĉ kravatoj. Sed Budhoj...? “Religioj en Japanujo estas bona industrio por profiti de malfeliĉuloj,” rimarkas nia saĝa gvidanto.



La Grand-Budha Halo *Daibutsu-den*.

Dum nia vojaĝo, mi ofte demandis al diversaj homoj la saman demandon: “Kiu estas via religio?” Rimarkinde, la respondo preskaŭ ĉiam estis: “Mi ne estas religiema.” Kurioze, en la praktiko multaj japanoj tamen iras kaj al budhistaj temploj (ofte estante membroj de unu el ili) kaj al ŝinto-sanktejoj por preĝi. Nia gvidanto ankaŭ atentigas, ke en la japana lingvo, la vorto por “preĝi” estas sama kiel la vorto por “peti”, do, plejofte oni iras al temploj por iu peto al dioj (bone fari la ekzamenon, trovi amat(in)on, ktp).

Ni eksciis, ke en Japanujo estas tre strikta “divido de agokampoj” inter la religioj: do, kristanismo okupiĝas pri modernaj geedziĝoj; ŝintoo pri ĉio, rilata al vivo (ekzemple, bebo-dediĉo, tradicia geedziĝceremonio kaj ĝenerale feliĉo kaj sukceso), kaj budhismo pri ĉio rilata al morto (ofte sur la tereno de budhistaj temploj troviĝas tombejoj).

Horju-ĝi-templo estas nia lasta vidindaĵo en Nara. La templo kaj la apuda pagodo staras netuŝite ekde la frua oka jarcento (kvankam eĉ ili ne estas la originalaj konstruaĵoj: la originaloj forbrulis en la frua sepa jarcento). Tiuj estas la plej malnovaj lignaj konstruaĵoj en la tuta

mondo! Estas malfacile kredi, ke tiujn belegajn konstruaĵojn, faritajn el ligno de japana cipreso, neniam damaĝis la fajro, nek la tertremoj!

Oni devas koni la lokojn!


Por fini la perfektan tagon, S-ro Kimoto portas nin al sia plej ŝatata drinkejo, kiu troviĝas sur malantaŭa strato, tute kaŝita per aliaj konstruaĵoj, sen ŝildo. Ĝi troviĝas en simpla eta japana domo, kie sur la dua etaĝo troviĝas la loĝejo de la posedantino. Ni komprenas, kiom bonŝancaj ni estas viziti tiun lokon – ja eksterlandanoj (kaj eĉ ne-eksterlandanoj!)

venas ĉi tien nur invitite de iu lokano. Tiu “ekskluziveco” tute ne estas intenca, diras la sesdekjaraĝa posedantino, kiu translokiĝis al Nara de Tokio. Ŝi estas tre babilema kaj ŝajne amuziĝas de nia (iom nekutima) kompanio. Menuo tute ne estas, sed la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj aperas antaŭ ni, sen ke ni devu mendi ilin. Fakte, la posedantino kuiras antaŭ ni, prenante ingrediencojn el eta (triono de kutima amerika) fridujeto. Mi havas multe da okazoj uzi la plej utilan vorton, kiun mi lernis en la japana: “ojŝii!” (“bonguste!”).

(*daŭrigota*)



Daruma, la fama japana nafaligebla pupo, ornamanta la restoracion.



Jenja AMIS

Naskita en Kievo, Jenja pasigis kvin jarojn en Atlanto kaj nun loĝas en Montrealo. Ŝi dum jaroj redaktis la revuon *Kontakto*, kaj nun ŝi laboras por la fonduso *Esperantic Studies Foundation*.

<evgeniya.amis@gmail.com>

Recenzo: *The Universal Language*

Nova filmo estas nur (ne tiel) ĉarma kuriozaĵo

Jim RYAN

THE UNIVERSAL LANGUAGE

Sam GREEN

25-minuta dokumentfilmo (en la angla) pri Esperanto, fare de reĝisoro Sam GREEN, kiu intervjuis parolantojn ĉe lastatempaj Universalaj Kongresoj. Ĉi tiu estas la dua el du filmoj – la unua, *Utopia in Four Movements*, debutis ĉe la festivalo *Sundance* kaj ricevis tre bonan reagon. DVD. 28:30 min. 190x140. 2011. Usono. **\$25.50.** (ligilo) [<http://goo.gl/3Detg>]



Kiam mi eksciis ke filmfaristo Sam GREEN eldonis kaj reklamis novan dokumentfilmon pri Esperanto, *The International Language*, mi tre ekscitiĝis kaj eĉ komencis pensi pri publikaj eventoj en Vaŝingtono uzantaj la filmon por kapti intereson pri nia lingvo.

Ĝis kiam mi spektis ĝin. Bedaŭrinde, ĉi tiu filmo ĉefe estas nur la plej lasta el longa serio de falsaj bildoj pri Esperantujo faritaj de usonanoj kiuj preferas ludi kun si mem, farante amuzajn kaj pitoreskajn portretojn de esperantistoj, ol fari la honestan, plenan, seriozan studon kiun la temo meritas – eĉ en duonhora videaĵo.

Eble mi unue menciu la plej bonan punkton, ĉar mi povas rapide trakti ĝin. La scenoj pri la historio kaj fono de Esperanto estis ne nur ĝustaj, sed ĝuste inspiraj. Green prezentis tion kun la respekta, altetaksa, preskaŭ karesema traktado kiun oni uzas por siaj geavoj.

Sed jen la problemo. Green klare rigardas Esperanton kiel ian geavaĵon, artefakton kiun oni respektu en ĝia skatolo sed ne utiligu aŭ

multe pripensu nun.

Por supozeble doni al la vidantaro bildon pri la esperantistaro hodiaŭ, Green intervjuis plurajn kongresanojn ĉe la UK en Jokohamo en 2007. Sed la intervjuitoj preskaŭ ĉiuj ŝajnis – ni diru, plej mildvorte, iom ekscentraj. Ĉiuj ŝajnis konfuzitaj kaj nekomfortaj antaŭ kamerao, kiel cervoj hipnotigitaj per la lumo de aŭtaj reflektoroj. Kelkaj eĉ ne povis respondi al simplaj demandoj aŭ eĉ rigardi en la kameraon mem, sed ĉirkaŭrigardis la ĉambron kiel zombioj.

Ankaŭ estas probable ke io en la maniero per kiu Green intervjuis la kongresanojn kontribuis al iliaj pli-malpli strangaj aperoj kaj konduto. Ekzemple, iu parto montris nur ŝajne neparolipovan esperantiston, en ia tranco aŭ komato, kaj ni nur aŭdis sinjoron Green aŭ iun alian intervjuanton diri, “Ĉu vi bonvole povus rigardi rekte en la kameraon?” Kial, je mil diabloj, meti tion en la fina filmo? Mi volis simile instrukcii al Green: “Ĉu vi bonvole povus fari rektan, racian filmon pri Esperanto per via kamerao?”

(Mi aldonu ke mi ŝatas la ekscentrecon de multaj esperantistoj – unu el tiuj ekscentraĵoj estas, ke ili malsamas de la ĝenerala spirita frideco kaj egoismo de nia nuna mondo. Ĉi tiu planedo bezonas pli da tia ekscentrismo. Sed la esperantistaro *ne* estas nur akademio de kosmokadetoj.)

Krom tio, la plejparto de “komentoj” de la intervjuitoj, kiujn Green uzis, konsistis nur el “Mi estas el Hungarujo ... Kanado ... Nov-Kaledonio ...” Ĉu esperantistoj ne kapablas diri ion ajn krom indiki siajn loĝlandojn? Mi suspektas ke multaj tiuj kongresanoj ankaŭ diris

pli aŭdindajn aferojn, sed ial la filmo ne montras ilin.

Ni ankaŭ memoru ke esperantistoj iras al kongresoj ĉefe ne por serioze aŭ erudicie proponi Esperanton, sed por amuziĝi per la lingvo. Eĉ intelektuloj kiuj ja iras tien por prelegi aŭ fari ion alian seriozan ankaŭ ŝatas ĝui la kongresan sperton – ekskursojn, dancojn, tavernumadon – ofte en T-ĉemizoj. Tial kongresanoj ofte vestiĝas tre neformale, eĉ komike – kiel aliaj homoj faras ĉe someraj kunvenoj, kies celo ankaŭ estas parte turismi kaj distriĝi.

Jes, la filmo de Green ja inkluzivas kelkajn elokventajn kaj raciajn proponantojn kiel Humphrey TONKIN, kaj frapajn argumentojn, kiel tiun de Arika OKRENT, ke Esperanto ne estas malsukceso, sed rimarkinda sukceso kiam oni konsideras ĝian nekredeblan kreskadon kompare kun aliaj planlingvoj.

Sed la malmultaj lertaj argumentantoj ne sufiĉis por ŝanĝi la ĝeneralan impreson, ke Esperanto plejparte estas relikvo kiu ne meritas seriozan atenton.

Ial, Green enmetis scenon pri triste malsukcesa kaj preskaŭ forlasita ĉina butikaro, kiu neniel rilatas al Esperanto – sence, krom ke tiu sceno aperis en lia antaŭa filmo, *Utopia in Four Movements*, kaj ŝajnas ke li volis reutiligi tiujn senutilajn sekundojn en ĉi tiu nova filmo, por doni eĉ pli malhelan atmosferon al la rakonto. Aŭ eble li simple intencis mallaboreme recikligi kelkajn sekundojn de videaĵoj nur ĉar li havis ilin.

Eĉ pli strange, post pluraj scenoj montrantaj Esperanton kiel utopiaĵon, komenĉiĝis parto montrante Stalin kun rakontado (de Okrent, mi kredas) ke oni lernis ke por efektiviĝi novajn sociajn ideojn kaj praktikojn vastskale sur multajn homojn, oni devas perforte devigi ilin, kaj tio evidentiĝis dum la 1930-aj jaroj. Kio?! Ĉu Green estis ligonta Esperanton kun Stalin kaj

Hitler kaj ties “utopiaj movadoj?” Sed tuj post tio (dank’ al Dio pro tio!) aperis Tonkin priparolante kiel la stalinistoj kaj hitleranoj kompreneble persekutis Esperanton pro ĝiaj idealismo kaj translima homaranismo.

Tiu konfuza kaj disa prezentado de Esperanto kaj la diktatoroj estis reprezenta de la konfuzo kaj diseco de la tuta filmo.

Eĉ la fina sceno, kiu montris grupon de esperantistoj dancantaj al rep-kanto en kaj pri Esperanto, ŝajne enestis ne por montri ke multaj el ni estas modernaj, mojosaj homoj kiuj ĝuas ĝisdatajn muzikon kaj dancadon, sed por pliprobudi la impreson de Esperantujo kiel amuza kuriozaĵo.

Eble la plej malgajiga sceno temis pri la nederlanda insulo Texel, kie pli ol mil esperantistoj loĝis antaŭe, kaj, kiel ĉirkaŭ unu okono de la loĝantaro, nature faris grandan rolon en la ĝenerala insula komunumo. Sed ne plu, la intervjuata nederlandano diris kun tragedia mieno, aldonante kaj angle kaj nederlande ke “la angla venkis” kaj ke “la angla nun estas la internacia lingvo, ne Esperanto.” La kamerao montris ankoraŭ starantan, sed nun rustan, esperantan monumenton kun verda stelo – nun verda nur pro likenoj, ŝajnas. Precipe plorige trista muziko akompanis ĉi tiun segmenton, kvazaŭ Green eĉ komplotis montri Esperantujojn (aŭ almenaŭ Texel!) kiel landon de “forlasu esperon, vi kiuj eniras.”

La spektantoj de tiu filmo tute surpriziĝus lerni ke:

- Esperanto havas pli da parolantoj ol iam ajn en sia historio.
- Pli da homoj ĉeestas UK-ojn kaj aliajn internaciajn Esperanto-kuniĝojn en la lastaj jardekoj ol en la “ora epoko,” kaj multaj el la plej sukcesaj UK-oj estis ekster Europo.
- Esperanto nun estas inter la 100 plej

parolataj lingvoj en la mondo (el 6800).

- Esperanto estas la 17-a plej uzata lingvo en Vikipedio.
- Esperanto estas unu el nur 64 lingvoj tradukataj per *Google Translate*.

Fakte, la granda (kaj kreskanta) ĉeesto de Esperanto en Interreto kaptis *nek unu mencion* en la tuta filmo. Eble estas Green kiu estas relikvo kiu ne komprenas la gravecon de la Interreto en nia mondo. Tutcerte ne estas ni esperantistoj kiuj ne komprenas tion.

Ĉar Esperanto estas tiel firme ligita kun la interreta epoko, oni povus argumenti ke ĝi estas pli moderna, pli 21-jarcenta, kaj pli estontecen-rigarda ol aliaj lingvoj.

Sed oni neniel kaptus tiun impreson rigardante la filmon *The International Language*. Kiel mi klarigis al multaj homoj dum multaj jaroj, la ĉefa kialo, pro kio la plimulto de homoj (precipe usonanoj) pensas ke Esperanto estas velkinta, naiva ideo el la pasinteco, estas ke ĝi ne plu estas nova, okulfrapa ideo, kaj tial ne plu kaptas la atenton de la publiko kiel antaŭe. Ĉi tiu nova filmo nur fortikigas tiujn oftajn miskoncepitojn pri Esperanto kiel ĉarma, neutila nostalgiaĵo.

Green ne estas proparolanto por Esperanto, kaj mi ne atendas ke li estu tia. Ni volas kaj meritas ne-propagandecan, honestan bildon pri Esperantujo faritan de neesperantisto. Sed la filmo de Green neniel estas tio.

La vera malgajeco de ĉi tiu filmo estas ke ĝi povintus esti valora komunikilo pri Esperanto al

la publiko, sed ĝi entute malsukcesis. Ni ne bezonas melodrame tristan muzikon por emfazi ĝiajn malsukcesojn kaj trompon de esperoj.

Mi precipe kompatas la esperantistojn, inkluzive de la *Esperantic Studies Foundation*, kiuj helpis produkti ĉi tiun cirkon – ili estas aparte trompitaĵoj.

En unu el ĝiaj scenetoj aperas Zamenhof riverencante, ŝajne por agnoski la akklamadon, kiun li kaj lia lingvo meritis, kaj meritas. Vidinte *The International Language*, mi ankaŭ emis klini min de la talio, sed ne por riverenci.

Ne estas Esperanto kiu ne meritas seriozan atenton. Ne estas Esperanto kiu estas kuriozaĵo kiu interese nur kolektantojn de tiaj relikvoj. Estas ĉi tiu filmo. Mi ne absolute konsilus ne aĉeti ĝin; ĝi enhavas kelkajn valorajn (kiel la jam menciitajn historiajn skizojn; majstrajn riverencojn; rep-kantojn; kaj la kontribuojn de Tonkin, kiuj inkluzivis lian deklamon de klasika poemo), sed tutcerte ne montru ĝin al la publiko por prezenti Esperanton. Alia kuriozaĵo, *The Aggressor Language*, donus pli admirindan kaj realisman bildon.



Jim RYAN

Jim estas prezidanto de la Esperanto-Societo de Vaŝingtono.

<quillpower@verizon.net>

Frazludo

Daĉjo RUTAN



Jen facile modifebla tabuloludo kiu helpas al vi kaj viaj lernantoj plibonigi la lingvoscion. Ĝi ankaŭ amuzos tiujn, kiuj jam bone konas la lingvon. Ludantoj bezonas scii almenaŭ la bazan gramatikon de Esperanto kaj la numeralojn 1 ĝis 12.

Tabulo: La tabulo povas havi ajnan formon, kondiĉe ke ĝi enhavas almenaŭ 40 fakojn. Ĉiu deka fako estas speciala, do ĝi devas aspekti malsame ol la aliaj. La tabulo bezonas ankaŭ lokon por stako da kartoj, prefere ie en la mezo. Faru vian tabulon el papero, kartono, aŭ eĉ ŝtofo, kaj ornamu la specialajn fakojn laŭvole.

Ludpecoj: Ĉiu ludanto bezonas unikan ludpecon. Se vi jam posedas aliajn tabuloludojn kiel *Monopoly* aŭ *Parcheesi*, vi povas simple prirabi ilin. Uzu ion ajn konvenan. Taŭgas eĉ koloritaj fermiloj de dentopasto-tuboj.



Kartoj: La grandeco de la kartoj ne multe gravas. Por mia versio de *Frazludo*, mi kvaronigis notkartojn. Mi rekomendas ke vi

komencu per facila vortprovizo de substantivoj, adjektivoj, adverboj, kaj la verboj *estas*, *estis*, kaj *estos*. Aliajn netransitivajn verbojn vi povas aldoni por komencantoj. Aldonu ankaŭ kelkajn kartojn kun *la* kaj *kaj*. Se la lernantoj estas pli spertaj, aldonu transitivajn verbojn, ekz. *vidas*, *ŝatas*, *amas*. Tiukaze aldonu ankaŭ kelkajn kartojn kun *-n*, *-jn*, kaj *-j*. Ĉe la fino de la artikolo vi trovos proponitan vortprovizon por komencantoj. Kiam viaj lernantoj progresas, aldonu novajn, eĉ stumbligajn vortojn.

Ludado: Komence, ĉiu ludanto ricevu kvin kartojn kaj metu sian ludpecon en la fakon plej proksiman al si. Laŭvice, la ludantoj ĵetu du ĵetkubojn kaj movu siajn ludpecojn tiom da fakoj sur la tabulo, **kalkulante la fakojn parole**. Ĉiufoje, kiam ludpeco atingas aŭ pasas unu el la specialaj fakoj, la ludanto prenu **du** kartojn de la stako. Je la fino de sia vico, ludantoj rajtas redoni du kartojn kaj preni unu de la supro de la stako. Tio utilas se oni amasigas multajn substantivojn, ekzemple, sed neniujn verbojn.

Kiel gajni: La celo estas **krei tri gramatike ĝustajn frazojn kun almenaŭ po kvin vortoj**. Ludantoj tiam laŭtlege siajn frazojn. La frazoj ne devas havi sencon, sed ili estu almenaŭ gramatike ĝustaj. Kiam oni aldonas sufiĉe da kartoj, frazoj foje aspektas kiel strangaj fragmentoj de poemoj. Multaj estos ridigaj.

Poenta versio de la ludo: Se vi volas etendi la ludon, eblas aldoni poentojn. En angulon de ĉiu karto, skribu poentonumeron. Kiam ludanto gajnas per kreado de tri frazoj, tiu ricevas la sumon de la poentoj sur ĉiu karto en la frazoj, minus la poentosumo de ties neuzitaj kartoj. Sube estas proponitaj poentoj. Vi mem juĝu pri vortoj kiuj estas malfacile uzeblaj, sed mi rekomendas, ke vi ne uzu numeron pli alta ol 5.

- substantivoj = 1
- verboj (transitivaj) = 2
- verboj (netransitivaj) = 1
- adjektivoj = 2
- adverboj = 3
- maloftaj korelativoj = 5
- prepozicioj = 3
- la, kaj, ĉi, ĉu, -n, -j, ktp = 0

Proponita komenca vortprovizo

Substantivoj

| | | |
|---------|----------|---------|
| besto | hundo | kato |
| urso | cervo | birdo |
| insekto | fiŝo | homo |
| patro | patrino | filo |
| filino | frato | fratino |
| tablo | seĝo | sofo |
| breto | fenestro | domo |
| avo | avino | pordo |

Verboj

| | | |
|--------------|--------------|--------------|
| estas (po 4) | estis (po 2) | estos (po 2) |
| sidas | staras | marŝas |
| vivas | manĝas | blekas |
| parolas | trinkas | rigardas |
| iras | dormas | kantas |

Adjektivoj

| | | |
|--------|----------|----------|
| granda | juna | alta |
| amika | komforta | laŭta |
| nova | seka | bongusta |
| bela | longa | dika |
| larĝa | pura | rapida |
| mola | feliĉa | |

Koloroj

| | | |
|--------|--------|---------|
| ruĝa | flava | blua |
| verda | oranĝa | purpura |
| blanka | nigra | griza |
| bruna | | |

(Skribu en kolora inko por helpi al lernantoj plifortigi ligojn inter koloroj kaj ties nomoj.)

Adverboj:

| | | |
|---------|---------|---------|
| rapide | bone | amike |
| matene | hieraaŭ | hodiaŭ |
| morgaŭ | ĉiutage | vespere |
| tagmeze | nokte | laŭte |
| foje | feliĉe | denove |
| frue | | |

Prepozicioj (po 2):

| | | |
|-------|----------|-----------|
| antaŭ | malantaŭ | apud |
| sub | super | sur |
| kun | ekster | al (po 4) |

Aliaj:

| | |
|------------|-------------|
| la (po 10) | kaj (po 10) |
| ĉu (po 5) | mal- (po 4) |

[Noto por legantoj de la papera versio: En la reta versio vi trovos ligilon por elŝuti preseblan tabulon.]



Daĉjo RUTAN

Daĉjo estas esploristo de fervoja historio en nord-okcidenta Nov-Jerzejo. Esperantoflanke li kunhelpis en la laŭtlegado kaj registrado de la Sankta Biblio kaj ĝuas helpi en la tradukado kaj voĉdublado de la filmoj de Christopher МИМ. Li loĝas kun sia edzino kaj filino en la urbo Franklin.

<nj.esperantist@gmail.com>

Trinkaĵo-truko

Hoss FIROOZNIA



Ludoviko administras trinkaĵo-fabikon kie li produktas dek du specojn de bongustaj trinkaĵoj:

Baghy-Banano, Boulton-Bero, Francis-Frambo, Grabowski-Grapfrukto, Kalocsay-Kolao, Miyamoto-Mirtelo, Miĥalski-Melono, Pirona Piro, Ragnarsson-Rubuso, Szilágyi-Sodakvo, Vinbera Venko... kaj, kompreneble, Zamenhofa Zingibro.

Por ĉiu speco de trinkaĵo ekzistas aparta maŝino kiu verŝas po 200 gramojn da likvo en markitajn ladskatolojn. Pro lastatempa misfunkcio, tamen, unu maŝino verŝas nur po 199 gramojn.

Por eviti riproĉon de sia estro, Ludoviko devas rapide konstati, ĝuste kiu speco de trinkaĵo estas difektita. Bonŝance, la fabriko havas tre precizan pesilon. **Kiom da pesoj, maksimume, Ludoviko bezonas fari por trovi la difektitan specon?**

Notu: la pesilo **ne** estas tradicia speco kun du pletoj kaj balanciĝanta baskulo, kiu komparas la relativajn pezojn de du masoj. Ĝi havas unu grandan bovlon en kiun oni metas pesotan mason, kaj ĝi montras la pezon de tiu maso sur ciferplato.



Ĉu vi havas solvon? Sendu ĝin al la redakcio, kaj inter la solvintoj ni lotumos du premiojn! Bonvolu sendi **nur unu** respondon al la redakcio **antaŭ la 15-a de Julio**, klarigante vian solvon. Ludoviko antaŭdankas vin.

senintenca esperantaĵo?

“Svelto”



Nia membro Jessica GRASSO fotis tiun ne tre sveltan logotipon de superbazaro *Svelto* en Cervia, Italujo. En la itala lingvo, la vorto ŝajne signifas “rapida”, sed sendube oni elektis ĝin por allogi esperantistojn kiuj serĉas sveltigajn manĝaĵojn.